

## **Maryvonne kaj Bruno Robineau – du francoj ravitaj pri Maramureș**

Antaŭ dudek jaroj, Maryvonne kaj Bruno Robineau - du francoj el la okcidento de Heksagono, parolantoj de esperanto lingvo, venis por la unua fojo al Maramureș - regiono en la nordo de Rumanio. Serĉante iun alian mondon, arkaikan, netuŝita de modernismo, la geparo kunfandiĝis kun la historiaj lokoj de nia distrikto. En la sekvaj jaroj ili verkis libron pri ilia tuta sperto, pri la vojaĝo al la sentempaj lokoj de Maramureș-vilaĝoj. Plie, Bruno iĝis vera ambasadoro, diskonigante al la francoj, kadre de pluraj konferencoj, la antikvan belecon de la regiono.

### **Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo**

Maryvonne kaj Bruno alvenis por la unua fojo al Maramureș en la jaro 1998 sed la deziro malkovri arkaikajn kulturojn venis el ilia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo. La itinero komenciĝis en Irlando, poste sekvis Israelo, Hungario, Bulgario, Barato, Ĉinio, Japanio, Korejo, Malaezio, Australio, NordKaledonio, NovZeelando, Polinezio, Kvatemalo kaj Bolivio. La tuta vojaĝo daŭris ok jarojn kaj la unua ilia celo estis plenumita - la geparo adoptis du infanojn: unu el Bolivio kaj la alia el Vietnamio. *“Antaŭ ol veni al Rumanio, ni vojaĝis tra la mondo. Kie ajn ni haltis, ni vivis en familioj, ni laboris en la vilaĝaj komunumoj, dividis kun ili nian vivon” – memoris Maryvonne.* La plej grava ilia avantaĝo estis ke ambaŭ flue parolis esperanton. *“Ni laboris ses horojn tage, tiel ni povis pagi la gastigon kaj manĝon. Plie, la homoj konsideris nin membrojn de iliaj familioj, eĉ partoprenante en la geedziĝfestoj aŭ entombigoj. Dum la tuta vojaĝo ni trovis multajn homojn, kiuj parolis esperanton.” – diris Bruno.* La libro “Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo” verkita de la geedzoj Robineau estis tradukita el la franca lingvo en esperanton, polan kaj ĉehan lingvojn.

### **La vilaĝo, kiu impresis nin plej multe estis Sarbi**

Estante en la daŭra serĉo de arkaikaj lokoj, Maryvonne kaj Bruno haltis en Rumanio, kie malkovris ke la historia Maramureș estas la ideala regiono, kiu respondas al iliaj celoj. *“Kiam ni venis por la unua fojo, ni restis ĉi tie kvar monatojn kaj ni venigis ankaŭ niajn gefilojn. Tiam ni iris en la vilaĝojn por malkovri la tiean vivon. La unua impresio estis la ĝojigo. Ni estis tute ravitaj pri ĉio, kion ni renkontis. Ege plaĉis al ni la vilaĝan vivon. Bruno devenas el familio de kamparanoj, li mem estante kamparano kaj en Maramureș ni malkovris tre fortan kolektivan vivon. Ni admiris la arkitekturon, ni vidis la tradiciojn, interesiĝis pri la religia vivo, ni pritraktis temojn kiel “la morto”, “la funebraj ritoj”. Impresis nin ankaŭ la festoj, precipe la Kristnaskfestoj” – klarigis Maryvonne.*

Dum ilia vojaĝo tra historia regiono de la distrikto, la du francoj vizitis vilaĝojn, kiuj situas sur Iza kaj Mara valoj. *“La vilaĝo, kiu impresis nin plej multe estis Sarbi. Ni enamiĝis al ĉi tiu vilaĝo ĉar tie ni trovis homojn bonvenigajn kun varmaj koroj. Komprenoble ni tre ŝatis ankaŭ la vilaĝon Calinești”, aldonis Maryvonne.*

## **Libro kaj konferencoj pri la sperto en Maramureș**

El la vidpunkto de kamparano, ekde kiam li paŝis por la unua fojo en tiu historia regiono, Bruno estis ravita de la vilaĝoj de Maramureș. *“Tio kio gravas estas ke ĉi tie, en Maramureș estas ankoraŭ vera terkultura civilizacio, kiu permesas al la familioj havi aŭtonomecon sen serĉi laboron aliloke. Mi estis kamparano ĝis kiam mi aĝis 32 jarojn kaj mi asertas ke ĉi tie ni spertas impresan formon de aŭtonomeco rilate al la manĝaĵoj kaj vestaĵoj, ankaŭ al la loĝejoj. Estas perfekta ekzemplo pri tio ke, en Eŭropa Unio estas lokoj, kiuj permesas al la homoj resti feliĉaj sendepende de la modernaj iloj. Estas io, kio en Francio tute malaperis! Kaj tiam, kiam ni povas manĝi de sur nia grundo, estas la unua rimedo de aŭtonomeco kaj ankaŭ de feliĉo. Por mi tio estas vera kulturo”* - diras Bruno.

La geedzoj Robineau verkis libron titolita “La vaganta Rumanio”. La spertojn ili dividis kun francoj en pluraj konferencoj, kiujn Bruno organizis. *“En Francio, Rumanio ne havis bonan imagon. La partoprenantoj estis surprizitaj malkovri ke, en Rumanio estas normalaj homoj, kiuj havas normalan vivon. Estis vera ĝojo paroli pri tio, kion ni trovis ĉi tie. Plie, ni ricevis gratulojn de iuj rumanoj, kiuj aprezis la manieron de nia prezentado pri Maramureș regionon, pri la kamparana vivo kaj komunista periodo. Mi provis klarigi ke la kamparanoj, kiujn la rumanoj konsideras arkaikajn, estas fakte tiuj, kiuj konservas la historion”, asertas Bruno.*

## **Impresoj post dek jaroj**

Post dek jaroj de la unua vizito, Maryvonne kaj Bruno revenis. Ili konfesas ke, en 2008 trovis la Maramureș vilaĝon en trista etoso, fakto generita de la foriro de homoj eksterlanden por trovi laboron. *“Kiam ni revenis, ni konstatis ke multaj vilaĝanoj estis foririntaj por labori. Venis en mian memoron la imagon de iu kamparano, kiu venis al ni plorante kaj kiu diris al ni ke liaj edzino kaj filino foriris al Italio por labori en hotelo. Mi tre kompatis lin! Sed la situacio estis pli grava – la infanoj restis hejmen prizorgataj de iliaj geavoj; la virinoj laborante solaj la grundon ĉar iliaj edzoj estis for. Estis vere trista imago! Ili havas monon, belajn domojn, saĝajn poŝtelefonojn, komforto, tamen ili estas tristaj!”* – rememoras Maryvonne.

Pasintajn tagojn, la geedzoj Robineau revenis al Maramureș por la tria fojo. Ili estis malpaciencaj revidi la evoluon de la regiono, kiu al ili estas tre kara, renkontiĝi kun homoj ligitaj al ili. Ilia itinero inkluzivis, kompreneble, la vilaĝojn Sarbi kaj Calinești. La konkludoj kaj observadoj estos la fonto de la dua libro pri Rumanio kaj por la konferencoj, kiujn Bruno organizos en Francio komence de la venonta jaro.

Dum la vojaĝo tra Maramureș regiono, sinjoro Emil Crancau – instruisto kaj parolanto de E-lingvo, helpis ilin tre multe. Emil Crancau estas membro de EAR (Asocio Esperanto de Rumanio) – asocio, kiu organizas en ĉiu jaro diversajn aranĝojn, kie oni prezentas prelegojn pri diversaj temoj (historio, kulturo ktp.) kaj kie oni organizas ankaŭ esperanto kursojn bazan. Emil Crancau

gvidis Maryvonne kaj Bruno dum ilia dusemajna restado en nia regiono. Poste, la geedzoj Robineau vizitos Bukovinon regionon, la monaĥejojn kaj poste ili revenos hejmen, en Francio, proksime de Nantes.

Tradukis el la rumana en esperanton,

Mariana Berariu

Artikolo prenita el la ĵurnalo "Graiul", la 29-a de julio 2019